

ESPERANTA FINNLANDO

1962

N:o 6

INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

JARKOLEKTO 1962 — 9 numeroj
A bonprezo enlanda 350 mk
eksterlanda 450 mk
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Emil Sten-
holm, Simo Raumavirta.

Redaktejo: Esperantotie 4, IIRIS-
LAHTI (artikoloj, novaĵoj, recenzoj,
interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj
societoj estas varme petataj konstante
kontribui per novaĵoj kaj interesaj
artikoloj, proponoj ktp., por ke nia
gazeto estu vera komuna informilo.

POHJOISMAISTA YHTEISTYÖTÄ

Tammikuun viimeiseksi viikonvaihteeksi oli Taalainmaan sivistysliitto yhdessä maakunnan esperantoyhdistyksen kanssa kutsunut opettajia valituskursseille, joka kohdistui kansainvälisen kielen kysymykseen. Luennoitsijoiksi oli kutsuttu Upsalan yliopiston tunnettu kielimies, suomen-sukuisten kielten tutkija ja Kalevalan ruotsintaja Björn Collinder, rehtori Karl Söderberg, niinkään Upsalasta, sekä maisteri Vilho Setälä. Kunkin osalla oli kolme luentoa, joiden pohjalla keskusteltiin.

Kurssin avasi rehtori Söderberg, joka luennoissaan esitti kansainvälisen kielen tarvetta nykyisessä kielten sekasorrossa, esperanton syntyä ja rakennetta sekä kielen merkitystä kulttuuritekijänä. Puhuja viittasi pariisilaisten yliopistomiesten äskettäin toimeenpanemaan esperanton perinpohjaiseen tutkimukseen ja sen ilmaisykyvyn selvittelyyn, jonka nojalla nämä puolueettomat arvostelijat olivat tulleet täysin positiiviseen tulokseen ja esperanton suositteluun.

Professori Collinder vertasi äidinkielen ja vieraiden kielten opis-

kelua ja opiskelun tuloksia ja osoitti, että kaikesta tällä alalla ilmevästä ahkeruudesta huolimatta kielellinen sekasorto on yhä voitattamaton, ja aiheuttaa varsinkin pienten kansallisuksien jäsenille ylimääräisen rasituksen, joka ei voi olla haitallisesti vaikuttamatta näiden asemaan kulttuurin ja tieteen kilpailukyvöllä. Puhuessaan tiedemiehistä hän korosti sitä, että kielipulma on edelleen kansainvälisen tieteen perusprobleema: sitä ei voi ratkaista minkään kansallisen kielen pohjalla. Ainoa keino on palata latinan pohjalle, yksinkertaistaa sen kielipiillinen rakenne ja täydentää sen sanavarasto nykyajan vaatimusten tasolle. Mutta tämä työ on jo tehty esperantossa. On totta, että esperantoa on arvosteltu ankarastikin, mutta kielimiehet, jotka eivät ole nähneet vaivaa perehtyä esperantoon, ovat lausuneet siitä niin paljon väärää ja mieletöntä, että se suorastaan nolottaa. Esperanton puolesta esitetyt lausunnot voittavat asiallisesti nämä arvostelut, ja niitä ovat antaneet eturivin kielimiehet, kuten Meillet, Cour-

tenay, E. N. Setälä, lukuisia muita mainitsematta. Puhutaan joskus myös esperanton kilpailijoista, mutta mikään niistä ei ole noussut esperanton tasolle. Ido oli pelkkä esperanton murre, eikä ensinkään sitä parempi. Occidental ja Interlingua koettavat hämätä sillä, että niitä muka ymmärtää ilman opiskelua. Tämä tietysti pitää paikkansa pieneen valiojoukkoon nähden, joka jo osaa niin monta eurooppalaista kieltä, että se tuskin henkilökohtaisesti tarvitsee yhteiskieltä, mutta kumpakaan tuskin kukaan on oppinut hallitsemaan puheessa ja kirjoituksessa.

Esperanto sitä vastoin on käytännössä koettu. Kuten Meillet on sanonut: kaikki teoreettinen väittely on turhaa, esperanto toimii.

Maisteri Setälä tervehti kurssien järjestäjiä ja osanottajia sanoen, että me annamme arvoa pohjoismaiselle yhteistyölle, mutta toteamme, että tätäkin meidän osaltamme vaikeuttavat kielipulmat. Ummikkosuomalaiselle on vieraiden kielten oppiminen vaikeampaa oman kiellemme erikoisaseman vuoksi, ja vain harvat ylioppilastutkinnon suorittaneet puhuvat sujuvasti ruotsia. Suomen esperantistit näkevät tässäkin avautuvan tehtävän esperantolle.

Maisteri Setälä siirtyi sitten päätehtäväänsä, kertomaan esperanton kokeellisesta opetuksesta Suomessa. Someron yhteiskoulussa suoritettu koe, joka on neljättä vuotta meneillään, on näet herättänyt huomiota kaikkialla missä kansainvälisen kielen

pulmaa pohditaan. Kokeiluhan on tähän mennessä osoittanut, että suomalaiset ensi-luokkalaiset oppivat yhdessä lukuvuodessa (6 viikkotuntia) niin paljon esperantoa, että saattavat jo ryhtyä kirjeenvaihtoon ulkomaalaisten kanssa, ovatpa useat heistä osittaneet tulevansa esteettä toimeen ikäistensä kanssa leikkikongressissa, jossa kymmenkunta kansallisuutta oli edustettuna. Edelleen he ovat voineet toisen vuoden alusta opiskella esim. maantietoa vierasmaalaisen opettajan johdolla, jolloin opetuskielenä on ollut esperanto. Toiselta puolen he ovat saksan kielessä pystyneet hyvin kilpailemaan toveriensa kanssa, jotka ovat lukeneet saksaa ensimmäiseltä luokalta alkaen, kun esperantonlukijat ovat aloittaneet saksansa vasta toisena vuonna. Vieläpä niin hyvin, että kolmannen luokan keväällä olivat (siis kahdessa vuodessa) suorittaneet saman oppimäärän kuin toiset (kolmessa).

Maisteri Setälä esitti edelleen oppiennätyksiä, mitkä oli vahvistettu kolmelle sokealle pojalle, jotka ovat saaneet Kouluhallituksen luvan suorittaa tutkinnon esperantossa latinan sijaan, lukion kurssiin kuuluvana. Tämän lisäksi hän näytti kehittämäänsä audiovisuaalisia menetelmiä esperanton opettamiseksi luonnonmenetelmän mukaan.

Kurssiin osallistui runsaasti kolmekymmentä kuulijaa, jotka olivat kiinnostuneet esperanton opettamisesta koulussa tai opintokerhossa.



**JAM ESTAS AŬTUNO! KAJ, ANTAŬ OL NI
TION RIMARKOS, ALVENOS KRISTNASKO!**

Tre taŭga kristnaska donaco por vi mem kaj por
viaj en- kaj eksterlandaj amikoj estas la malmul-
tekosta sed riĉenhava abonita

ESPERANTA FINNLANDO

JUNKSO, JINKSO

Ĉu ne estas amuza rubriko? Du vortoj, kiuj havas la saman signifon. La unua vorto estas vere esperanta. Ni trovis ĝin en la finna-esperanta vortaro de Setälä. Ĝi do estas uzebla en nia lingvo. La dua estas formita de la angla vorto jinx, mi unue intencis uzi ĝin, sed trovinte la alian en la vortaro, mi nature rezignis. Sed junkso ja estas birdo, klinkola birdeto, kiu vere havas malbonan reputacion. Ĉi estas parenco de pego, sed, kompatinda, havas multe, multe pli malbonan reputacion! Verdire, mi ne scias ĉu la pego havas malbonan reputacion. Sed, kiel eble jam dirite, la junkso havas. En la angla lingvo oni verŝajne ne memoras, ke la nomo jinx estas la eta junkso. Ili nomas la junkson wrayneck, kaj ĝia alia nomo, jinx, signifas ion ajn, kio kunportas malbonan feliĉon kaj malbonŝancon. Povas esti persono, objekto, tempopunkto, kio ajn, sed se ĝi havas la famon esti jinkso, ĝi vere estas danĝera! Kelkaj maristoj kredas, ke virino en la ŝipo estas vera jinkso, kaj oni ne povus allasi ŝin enbarkiĝi. La scienca nomo de la junkso estas *Iynx torquilla*, se iu ornitologo ne tuj estus rimarkinta, pri kiu birdo ni rakontas. En la finna lingvo ni nomas ĝin Käenpiika, sed la jinksa funkcio de portanto de malbona ŝanco ankaŭ en nia lingvo estas jugita al la birdo. Ni ja parolas pri la »birdo de malbona vetero«, per kio ni ne priskribas ne nur la portanton de meteorologiaj malbonaĵoj.

Sed, nature, ni ne estas superstiĉaj, ni ne kredas, ke povas ekzisti tiaj jinksoj, nur ĉarmaj flugantaj junksoj.

Tamen...

Vi, kara leganto, certe rimarkis, ke nia kvara numero terure malfruiĝis. Nun mi volus iom senkulpigi min, ĉar, finfine, mi ja estas respondecata pri, pro... Jes, sed mi havis JINKSON! Tio ja nature tute

min senkulpigas, ĉu ne? Vi ĉiuj certe memoras la belan piramidan vinjeton en la unua paĝo de nia kvara numero. Certe. Tia piramido funkcias kiel emblemo al tiaj homoj kiuj ne estas iel ajn superstiĉaj. Tiaj homoj sin nomas liberpensantoj, mi neniam mem apartenis al liberpensantoj, ĉar mia penso, mi ĝin rimarkis, neniam estis tro libera. Bedaŭrinde. Tamen mi konsideras min esti tute, kemie pura de superstiĉo, mi ne kredas pri dio ktp. Sed nun... Ĉu vere povus esti, ke la »pli altaj fortoj« kontraŭstaris al la publikigo de tia liberpensula simbolo, ĉar ĝuste tiu piramido »jinksis« nian tutan aperadon!

Unue, ni havis nur unu desegnaĵon pri tiu ĉi piramido. Ni ĝin obeeme portis al la firmao, kie oni normale tre bone kaj rapide preparas kliŝojn. Kun bona espero ni ĝin tien portis, sed oni promesis ĝin preta nur la duan aŭ trian de majo. Oni ne povis helpi, kvankam tio signifis ioman prokrastiĝon. Sed, la trian de majo oni telefonis el la kliŝofirmao, ke la piramido ne estas preta, ĝi pretiĝos post du aŭ tri tagoj. Kiam ni post du tagoj persone venis por ĝin havi, oni estis devigataj konfesi, ke la desegnaĵo kaj la jam preta kliŝo misterie malaperis! Estis tre koleriga situacio, ĉar la gazeto jam aĉe malfruiĝis, kaj... Oni tamen promesis kun ĉiuj fortoj serĉi la malaperintojn. Sed vane. Finfine ni devis kredi, ke la desegnaĵo estas tute kaj definitive en iu mistera loko, kiun neniu povas diveni. Ĉar estis nur unu sola desegno pri la piramido, kaj la artisto ĝin desegninta jam morta, ni troviĝis en iom embarasa situacio. La ĉefredaktoro tamen iamaniere kapablis produkti novan skizon, kaj ni lasis konatan reklamartiston ĝin redesegni por fotografado en la kliŝofarejo. Nu, tio bone okazis, kvankam iome

aferojn prokrastis la subita kaj nekalkulita malsaniĝo de nia artisto! Tamen, en sufiĉe bona tempo, ni revizitis la kliŝofirmaon, kiu pie ĵuris tiun tempon ne perdi la varon. Kaj, fakte, ĝi ne perdiĝis. Ni estis tre gajaj, ricevis la novan kliŝon post nur kelktaga atendo, kaj sendis ĝin kune kun la alia materialo al niaj presistoj en Kokemäki. Ĉio ŝajnis esti en ordo. Sed nun okazis io, kiu nin iĝis pensi pri vera »jinksado«. Nia amiko kaj samideano, sinjoro Ĉefpresisto al ni telefonis, rakontante, ke la gazeto estas prete komposita, korektita kaj aranĝita, mankas nur la kliŝc-piramido, kiu senŝpure forevaporis en la presejo. Oni tre zorgeme traserĉis, sed sen rezulto! La presejo estus havinta kliŝon kun piramido, kune kun la sfinkso, sed tion ni ne volis akcepti, ni definitive volis uzi la alian piramidon, tiun kun la jinkso. Ni do reiris al la kliŝofarejo kaj kun rido konstatis, ke la antaŭa kliŝo ree malaperis, kaŭzinte ankaŭ en la presejo aldo-

nan trapurigon de ĉambroj. Estis tre amuze. Kaj la kliŝo-homoj promesis, ke ni povas certe havi la novan post du tagoj, kaj estus plej rapide, se ni mem ĝin iru por forpreni. Ni estis tre saĝaj: ni unue telefonis kaj demandis, ĉu la kliŝo jam estas preta. Kaj ĝi, laŭdire, estis.

En la kliŝofarejo ni tuj vidis kelkajn eltirojn faritajn per la nova kliŝo. Ni estis tre kontenta: finfine! Sed, mirindaĵo, neniuj kapablis trovi la klison! Nur la eltiroj estis troveblaj. La personaro de kliŝofarejo serĉis kaj serĉis kaj iom blasfemadis kaj serĉis, sed vane. Fine restis nur, kiel fina rimedo, ke oni faru novan kliŝon, jam trian, pri la sama motivo! Damne, oni promesis agi en du horoj, sed la kliŝo estis en niaj manoj nur post du tagoj.

Fine ni povis ĝin sendi al la presejo en Kokemäki, kaj la gazeto aperis. Sed... ĉu vere iu nevidebla penis nebligis publikigon de tia emblemo de liberpensantoj? Sr

HINDAJ VORTOJ EN ESPERANTO

Esperanto senĝene akceptis multajn vortojn, kiujn la angla kaj aliaj eŭropaj lingvoj pruntis el la diversaj hindaj lingvoj. La Plena Vortaro de Esperanto enhavas multajn radikojn, kies origino estas Hindujo.

Punĉo, la varma trinkaĵo el alkoholaĵo, sukero, fruktsuko, akvo kaj citrono aŭ aliaj aromaĵoj, enhavis kvin ingrediencojn en la 17-a jarcento en Hindujo, kie ĝi originis. Inter la tiamaj ingrediencoj estis teo kaj arako. Ĝia hinda nomo estis **panĉ**, kies signifo estas **kvin**.

Sampuo uzata por lavi la harojn devenis de la hinda **ĉampana** (masaĝi, premi).

Pario, homo el la plej malŝatata kasto ĉe la hindoj, devenis de la tamila **paria**.

Ĝangalo venis de la hinda kaj maratia vorto **ĝangal**.

Verando en Hindujo estis **veranda**.

Kareo, kiu spicas kokidaĵon kaj rizon en manĝaĵoj, estis komence la tamila vorto **kari**.

Kulio estis origine la nomo de hinda indiĝena tribo **kuli**, aŭ **koli**, kiu loĝas en Guzerato.

Kakia, la malhelflava, polvobruna koloro, venis de la urdua vorto **kaki** (polva).

Poloo, la surĉevala pilkludo, devenis de **polo**, la nomo de pilko en la dialekto baltia de la Indusa valo.

Mango, la arbfrukto, venis de la malaja **manga** kaj la tamila **mankej**.

Kalikoto, la kotona teksaĵo, estas nomita laŭ la hinda urbo **Kalikato**



KIEL KAJ KIAM MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Mi abonis svedan semajnan gazeton, en kiu aperis en 1906 kurso pri Esperanto. Antaŭe mi nenion sciis pri ĝi. Sed mi tuj komencis lerni. Sed badaŭrinde, la verkinto de la kurso uzis la latinajn gramatikajn esprimojn — substantiv, adjektiv, verb, kaj tiel plu. Tiujn tri mi komprenis, sed ne la aliajn, kaj ĉar mi estis tute sola, estis por mi malfacile lerni la lingvon.

Mi sciigis, ke ĝi estas multe fleksebla, kaj tiel mi en la komenco opiniis, ke »estas -inta» kaj »estis -anta» estas egalaj.

Mi ne komprenis la valoron de »Internacia helplingvo», mi nur opiniis ĝin amuza okupo, tial mi ne estis diligenta. Mi ricevis propagandilon pri iu esperanta gazeto, »Esperantisten». Sed ĉar mi pensis translokiĝi, mi demandis en la poŝtejo: Ĉu Esperantisten ankoraŭ aperas? Ĝi aperis, kaj mi abonis ĝin.

Sed! Ho, ve! Kia lingvo! Ĉiuj supersignoj estis for, kaj kvar novaj literoj aperis. La lingvo de la gazeto nomis sin: Esperanto simpligita, kaj la originalan lingvon: Esperanto primitiva. Mi komprenis, ke estas konkursanta lingvo, kaj mi ekpensis: »Du lingvoj, kiuj konkuras, ne povas sukcesi!» Kaj la intereso nuligis, tamen ne tute malaperis. Post paro de jaroj mi legis en la gazeto: »Spite la konkuradon de Ido, Esperanto progresas». Estis Ido, kiu unue nomis sin »Esperanto simpligita». Kaj mi

ankaŭ en kristana gazeto legis: »La nova Testamento estas tradukita esperanten». Tiam mi pensis: se oni tradukis la Novan Testamenton en Esperanton, la lingvo estas menciinda verko.

Kaj mi serĉis lernolibron por Esperanto. Jes, mi sukcesis, — sed, ho, ve! nur subst. adj. k.t.p. Sed mi sukcesis ricevi alian lernolibron, kiu havis paralelajn tekstojn, kaj tio helpis al mi.

Mi estis petata instrui studrondon en Esperanto. Kaj iu el miaj lernantoj sciis kaj la svedan kaj la anglan gramatikojn, kaj tiu helpis al mi je la gramatiko. Per tio mi konstatis, ke per instruo oni lernas. Poste mi alĝis al studrondo en la gepatra lingvo por lerni gramatikon.

Sed mi ne ĉesis; mi trapasis la elementan ekzamenon, la altan ekzamenon, kaj tie mi ricevis la ateston »Laŭdinda», kaj la instruitan ekzamenon, sed tie mi ne ricevis tiom altan ateston, ĉar estis tute skriba kaj tute sen kontrolo.

Nun mi bone komprenas la internacian valoron de nia facile lernebla lingvo.

Albiĉjo.

La supran verkajon ni ricevis el nia sveda samideano Albin Johansson, kiu ĝin sendis kune kun siaj naskiĝtagaj gratuloj por Vilho Setälä. Ni volas, kvankam malfrue, gratuli ankaŭ al »Albicjo», kiu fariĝis en lasta januaro 80-jara! Gratulon!

aŭ **Kalkuto**.

Kopro, sekigitaj kernoj de kokusnuksoj, estis **koppara** en la malajalama lingvo kaj **kopra** en la hinda. En ambaŭ lingvoj la vorto signifis okcson.

Betelo, piproarbo kaj maĉaĵo el ĝiaj folioj, estas probable portugala

adaptaĵo el la malajalama vorto **vettila**.

Mungo, la mamulo kiu mortigas serpentojn, en la maratia lingvo estas **mangus**.

(Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Infoservo el artikolo de Naranjan Singh Uppal).

NOVA FAKO DE GRAJNOJ EN VENTO:

Teknika kaj Scienc Rondo

La subskribanto de ĉi tiu cirkulero, en akordo kun S-ano Marcel Erbeta, direktoro de la internacia movado GRAJNOJ EN VENTO, alvokas la Esperantistaron por ekagi en la NATURSCIENCA KAJ TEKNOLOGIA KAMPOJ.

Esperanto nun estas sufiĉe bone envojigita el la literatura vidpunkto, sed estas evidente ke ĝi ankoraŭ ne sufiĉe povis montri siajn eblecojn el la vidpunkto de la scienca interŝanĝado. La nuntempa teknologia mondo postulas tiun kondiĉon por poste akcepti lingvon kiel taŭgan komunikilon.

La nova fakrondo de GRAJNOJ EN VENTO celas daŭrigi kaj ampleksigi la klopodojn jam faritajn en tiu ĉi kampo (ekz.: »Sciencaj Studoj«).

Jen la proponata agado:

— La sciencistoj-Esperantistoj povos publikigi rekte la rezultojn de siaj esploroj en Esperanto;

— La aliaj Esperantistoj devos serĉi en la sciencaj medioj de siaj landoj aŭ urboj, taŭgajn publikigindajn esploraĵojn, kaj traduki ilin Esperanten;

— En fiksota dato, la partopre-

nontoj sendos fiksovan kvanton da kopiojn (ekz.: 50, per mimeografo) al la subskribanto;

— Li, per la ricevataj kopioj, eldonas gazetojn enhavantajn 1 kopion el ĉiu partoprenanto;

— Ĉiu partopreninto ricevos 1 (aŭ pli) ekzemplerojn;

— Oni petas al la samideanoj interesitaj, TUJ skribi al la subskribanto, ĉu ili estas pretaj kunlabori. Se kuniĝos sufiĉa nombro, li indikos al ĉiu daton, kvanton da kopioj, kaj aliajn necesajn detalojn por la unua eldono;

— Se la rondo sukcesos, kaj poste aperas pliajn kunlaborantojn, oni povos disbranĉigi ĝin laŭ pli specialigitaj fakoj, ekzemple: kemia, elektroteknika, biologia rondoj.

Montevideo, februaro 1962.

ESPERANTISTOJ!

SCIENCISTOJ!

Ek al la laboro!

Esperanto devas esti ankaŭ

INTERNACIA SCIENCA LINGVO.

Alberto Barrocas

Yaguari 2248, Ap. 3

Montevideo, URUGVAJO.

(Lau eble, aldonu respondkuponon).



Esperantokurso en liberinstituto Aurala en Turku, februare 1962. La kursgvidantino sinjorino Aino Kavenius sidas ĉe la standardo.

KORESPONDEMULOJ

Filipcrak Danuta
ul. Cravneckiego 35/7
Ostróda
Pollando

Instruistino, kiu volus trovi junajn (13—15 jarajn) korespondantojn por siaj lernantoj.

Theodor Löttsch,
A. Bebel-Strasse 18, I
FROHBURG i. Sa.
(Kr. Geithain)
DDR

Sinjoro Löttsch estas 72-jara veterana esperantisto (Lernis la lingvon antaŭ 51-jaroj!) Li volonte korespondus pri plej diversaj temoj.

Karlo Štulc
K. S.-BELEHRADSKA
3-Ŭsti n.l.
Ĉeĥoslovakia

18-jarulo, kiu volus interŝanĝi fonodiskojn kaj muziknotojn precipe pri twist, rock, boogie, ktp.

S-ino J. Goodwin
Beach Rd.,
DARGAVILLE
New Zealand

40-jara dommastrino, eksinstruistino, kiun interesas muziko kaj literaturo. Ŝi estas komencanto, sed ŝia lingvaĵo ŝajnas esti tre bona!

Esperanto-Grupo de la Elektra kaj Kablofabriko
Gyömrői út 128
BUDAPEST X
Hungario

Komencula studgrupo, kiu serĉas korespondantojn por la anoj.

Krzysztof Pokojowczyk
Ul. Pulaskiego 24/7a
KALISZ woj Poznań

21-jara pola viro, nova esperantisto, interesita pri Finnlando, ankaŭ filatelisto.

Brosck Kurt
ul Jagiellonska 24 m 5
OLSZTYN
Pollando

Komencanto, kiun oni devus lingve instrui. Tre entuziasma filatelisto.

Jen ree aro de korespondemuloj, kiuj volus trovi amikon en nia lando. Restas unu letero, en nia tirkesto, kiun ni ne transformas al anonco, sed publikigas ĝin tute, ĉar ĝi, estante tre ĉarma, ĝin valoras. Ni esperas, ke ie troviĝus konvena korespondanto por la malgranda petanto.

Estimataj sinjoroj,
mi estas okraja knabino kaj mi vola korespondi kun ia knabino el via lando. Mia onklo laboris tri jaroj en Finnlando, rakontis al mi pri via patrujo kaj montris al mi multajn fotografaĵojn. Mi amas Finnlandon kaj mi deziras havi amikinon tie, kiu volus korespondi kun mi. Mi petas vin trovi tian knabinon kaj dankas al vi sincere.

Maria Stehliková
Pštrossova 2
PRAHA 1
Ĉeĥoslovakio

MALBONA AFERO

Antaŭ unu jaro ni rakontis pri tre ĝojiga okazaĵo: la granda librovendejo Suomalainen Kirjakauppa en Helsinki konsentis, post iom longa persvadado fare de esperantistoj, havi en sia stoko esperantajn librojn. En la komenco ĉio ŝajnis esti en perfekta ordo. Libroj elvendiĝis en sufiĉe rapida takto, sed poste, jes poste niaj samideanoj tute forgesis kie esperantlingvaj libroj estas haveblaj sen neoportuna poŝtlivero. Ni do volas memori al ĉiuj amikoj, ke ni povas plej bone montri la grandecon kaj fortecon de nia movado indikante ĝin ankaŭ per tio, ke estas profite negoci kun esperantistoj! Ni vidis, ke estas multaj tre interesaj libroj en la nomata vendejo, eĉ la novaj belegaj (kaj moderprezaj) libroj de Daily Mail, Libro pri bestoj kaj Amuzo per scienco. Ili ne estas en multaj ekzempleroj, sed la plej rapidaj ilin senpere povas aĉeti!

AKM

SPECIFIKA FAKTURÓ

Fortamotora aŭtomobilo pene veturas al Aberdeen (kie la ŝparemaj skotoj loĝas). Meze de granda erikejo la motoro subite paneas, kaj restas silenta, kiel sfinkso en la dezerto. La aŭtoposedanto eklaboras, laboras, laboregas dum du horoj kaj tridekdu grasmakuloj. Vane. La motoro restas fidela al sia nova, silentema karaktero.

Fine la forĝisto de proksima vilaĝo estas alvokita. Li malfermas motorkovrilon, rigardas kun serioza mieno, martelfrapas leĝere trifoje iun certan lokon, kaj — miraklo! La motoro komencas funkcii!

— Kiom mi ŝuldas?

— Estas kvindek ŝilingoj.

— Hm. Iom tro multekoste, ŝajnas al mi. Kiel la sumo konsistiĝas?

— Unu ŝilingo pro la unua frapo. Unu ŝilingo pro la dua frapo. Unu ŝilingo pro la tria...

— Jes, jes, tio faras tri ŝilingojn. Sed pro kio la resto, kvardeksep?

— Kvardek sep ŝilingoj pro la scio kien precize frapi!

* * *

RAPIDA RESPONDO

En teatro oni ludas Richard III. La ĉefaktoro ĵus krias: "Ĉevalo, ĉevalo, reĝolandon pro unu ĉevalo...!"

En la teatra galerio krias iu, kiu sin opinias tre amuza: "Ĉu sufiĉus azeno?"

La aktoro tuj respondas: "Jes, bonvolu venu ĉi tien!"

* * *

LA ĜEMELOJ

En la familio estis ĝemeloknaboj. Sesmonataj ili estis tute samaspektaj, kiel du pizoj. La najbaroj, post longa cerbumado, fine kuraĝis demandi la patrinon: "Bonegajn knabojn vi havas, sinjorino, sed rakontu al ni, kiel vi povas distingi ilin. Kial vi ne tute miksiĝas ilin?"

"Sed tio estas ja simple! Kiam mi metas mian fingron en la buŝon de Ernesto, ĝi ne estas Ernesto, sed Johano, se ĝi mordas!"

* * *

OLEO, OLEO...

Germana inĝiniero vojaĝis en multaj urbetoj, farante paroladojn pri la oleo kaj ties aplikoj. Iuloke li finis sian referaton, petante la ĉeestantojn fari demandojn, se io restis malklara. Iu sinjorino en la dua seĝvico tuj demandis: "Unu aferon mi ne komprenas. Kiam via firmao starigas novan benzinstacion en iu stratangulo, kiel vi povas antaŭe scii, ke ekzistas benzino aŭ oleo sub la pumpilo?"

* * *

IKF/FINNLANDA SEKCIO, JARKUNSIDO

La jarkunsido okazis en Laihia en gastema hejmo de Hugo Salokannel. Komence oni kantis komune psalmon »Jam venis tempo varma«. Post tio Olavi Lehtonen parolis pri graveco de preĝo, ĉar sen Dia helpo nia laboro ne sukcesos. Hugo Salokannel bonvenigis ĉeestantojn kaj parolis pri utileco de Esperanto.

Jarraporto, kasa raporto kaj agadplano estis aprobitaj de la kunsido. Oni decidis, ke ne estu deviga membrokotizo en nia sekcio.

Pri estontecaj perspektivoj de nia agado oni diskutis vigle kaj longe. Oni faris multajn sugestojn por nia agado en estonteco. Oni konstatis, ke sen aktiva apogo de pli vasta rondo de gefratoj ni ne povas multe vigligi agadon. Oni decidis plu aperigi nian organon, Kristana Fratara kaj disdoni kristanan literaturon, precipe Novajn Testamentojn. Oni faris ankaŭ aliajn sugestojn.

Estrararo elektita en la kunsido:

Prezidanto kaj sekretario, Olavi Peltonen — vicprezidanto Jaakko Hirigankas — vicsekretarioj Hilikka Hölsö kaj Hugo Salokannel — kasisito Elina Salokannel — agadgvidanto Hugo Salokannel. Aliaj estraranoj Kaarlo Jokinen kaj J. N. Mikkola.

Reviziantoj Juho Lepsi, Oiva Rintamäki kaj Esteri Mäkinen.

Jaakko Hirvikunnas legis artikolon de prof. Martti Hela pri Esperanto. Oni legis salutojn alvenintaj al kunsido kaj salutis episkopojn Salomies kaj Lehtinen.

La jarkunsido donis al ĉeestantoj novan esperon kaj kuraĝon por daŭrigi nian laboron.

O.P.

